# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 18/10/2018 Tricentnaŭdeksesa eldono (unua eldono 20/09/2011)**

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur kun la dekaj eldonoj

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj. Klaku ligojn por kapabligi la malfermon*** *(aŭ eble Ctrl+klaku ??)*

**PMEGramatiko** *reta-vortaro* **Freelang Vortaro* **Plena Ilustrita Vortaro*

* *Esperanta Retradio* * *Google Translate* * *Pasintaj eldonoj* * *Duolingo* * *duolingo all courses*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 744,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas 385,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 305,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 54,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## GRAMATIKA SERIO "ĈU VI SCIIS?" N.ro 6 .



**3e**. La personaj pronomoj estas tiom mallongaj, ke ni ne povas uzi ilin en vortkunmetaĵoj. Ekz. ne uzeblas "La ŝipatro" por "La patro de ŝi" nek "La ĉiellio" por "Li en la ĉielo". **4e**. Kiam la kunmetaĵo estas tro longa pro kunmeto da kvar aŭ pli da elementoj, kaj, escepte de germanoj, ne povas facile komprenati, ni forlasas la aglutinecon kaj uzas ĝin en du aŭ pli da analizaj elementoj. Ekz. "La najbarĝardenaltarbfolioj" normale uzatas per "La folioj de la alta arbo en la najbarula ĝardeno". **5e**. La fremdajn nomojn oni en Esperanto ne povas uzi en aglutinaj kunmetoj. Ekz. oni ne povas diri "La Zamenhofverkoj", sed devas diri "la Zamenhof'aj verkoj". **6e**. Oni ne faras sensencajn kombinaĵojn kiaj "La vizaĝo de la aero" kaj "Akvomaĉi". **7e**. Pluraj prepozicioj ne povas kombinati kun "al" aŭ la Akuzativo, pro ilia signifo, ekz. NE "por la patrinon" nek "sidi al la luno" (sed jese "Sidi la lunon" por "sidi sur la luno".



(daŭrigota). *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Torquay Esperanto-Ekskurso

Dimanĉon la 20an de oktobro. Venu! Vidu AE 384on. Amike *Marumi Smith*

# La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendos vin.



La 20a de oktobro estos la tria sabato. Venu al bela Manlio, bona sperto, bona Esperanto, bona loko, bonaj amikoj kaj senpaga kafo. *Roger Springer*

# Bela Amuzo en AE395

**Kara Roger,**

Jam longe ne plu mi konfirmis la regulan ricevon de via "Aŭstraliaj Esperantistoj", kiu ĉiam donas interesan informon, kelkfoje ankaŭ distron.

Kun amuzo mi legis, ke en via ne-Europa mondoparto oni uzas la vorton kluki por io tute alia, ol Zamenhofo. Mi supozis laŭ PIV, ke temas pri la kriado de kokinoj. Mi ne povis elprovi tiun "Ctrl+kluku", ĉar mia komputilo ne kapablas rekoni voĉojn, nur la tajpitajn leterojn aŭ la musklakojn.

Amuzite salutas, *Utho Maier*

**Kara Utho**

Vere dankon por via letero. Mi elsendas pli ol tricent-AEojn semajne, sed tre malofte ricevas informon ke oni ne forviŝas ĝin sen antaŭe legi ĝin. Dankon por la konsilo pri la kluku/klaku eraro.

Mi ŝatus ke la "Aŭstralianaj Esperantistoj" estu perfekta, sed se oni prokrastas ĝis perfekteco, oni faras nenion, ĉar la morto atendas nin.

La problemo pri Aŭstralianoj estas ke ni estas homoj kaj kelkfoje eraras. Ni ne estas perfektaj. (Kompreneble krom nur unu preskaŭ geniulo.) Amike *Roger Springer*

# Respondo al Franciska Toubale:



Kara Franciska,
la aserto, ke en Esperanto la vortordo estas libera, rilatas al la gramatiko, ne al la enhavo de frazoj.
Viaj ekzemploj montras la regulon, ke la vortoj plej forte rilatas al siaj najbaroj.
Sed vi pravas, kiam vi diras, ke la vortordo (gramatike) ne estas libera: "Libro la sur kuŝas tablo iu." Tio evidente estas nur salato, ne frazo.

En mia gramatika kajero mi nur diras, ke en ordinara frazo la sinsekvo de la frazelementoj estas libera. Jam por demandaj frazoj tio ja ne plu validas: Demando en Esperanto komenciĝu per demanda vorto. Amike, *Peter Weide*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Se Japanaj Ĝardenoj, ĉu ankaŭ Ĉinaj Gardenoj?



**ĈINA HELPKRIO !**

Mi esperas, ke ĉiuj legantoj legis la alarmokrion de ĉina Esperantisto, ke Esperanto estas tro malfacile lernebla por la ĉinoj. Mi esperas ankaŭ, ke ĉiuj legantoj intencas fari ion pri tio.

Laŭ la helpkrianto ĉina, Esperanto estas tro malfacila ĉar ĝi estas aŭ fariĝas tro eŭropa. Li mencias, ke jam la baza Zamenhofa vortaro estas facile lernebla por eŭropanoj, ĉar la vortoj similas al vortoj en la eŭropaj lingvoj. Sed ege krome la eŭropanoj enkondukis en Esperanton dum la lasta duonjarcento multegajn novajn vortojn eŭropdevenajn, por kiuj oni devus uzi kombinaĵojn de jam ekzistantaj, bazaj vortoj. Ĉiuj tiuj novaj vortoj estas el eŭropaj lingvoj, ne el la ĉina lingvo, kaj do la malfacileco por ĉinoj pligrandiĝas grave. Ankaŭ la gramatiko estas eŭropa, ne ĉina, kaj tial tro malfacila por ĉinoj. Kaj mi supozas, ke tio validas ankaŭ por aliaj aziaj popoloj kaj por afrikanoj. Do ni, eŭroplingvaj Esperantistoj, mistraktas la parolantojn de neeŭropaj lingvoj. Malgraŭ niaj belaj vortoj pri doni pli da rajtoj kaj pli da uzoj por la malgrandaj etnaj lingvoj.

Ankaŭ Renato Corsetti menciadas, ke ni devas enkonduki pli da neeŭropaj vortoj en Esperanton. Sed tio nur iomete helpas, ĉar se ni enkondukas ĉinan vorton, tiu vorto estas same fremda kaj malfacile lernebla kiel eŭropa, por neĉinaj neeŭropanoj. La solvo devas esti alia, kaj nun Renato forte laboras por tiu solvo.

Do kion ni povas fari? Ni unue ekzamenu la fakton de la facileco kaj malfacileco, kaj kion ni ne povas fari aŭ ŝanĝi.

La lingvoj de la mondo havas vortformadon kaj gramatikon tre malsamajn. Estus tre malpraktika, ĉar ne faciliga, krei internacian lingvon per la miksado de la vortfaradoj kaj de la gramatiko kune uzante la tre multajn specojn de la multaj lingvoj. Oni ekzemple ne povus kombini longajn vortojn signifantajn unu tutan frazon kun alia sistemo kiu uzas apartajn vortojn por ĉiuj aspektoj de la realeco. La lingvo fariĝus tro komplika kaj malfacila. Same oni ne povas kombini malsamajn specojn de gramatiko. Konsekvence oni devas, por krei internacian lingvon, utiligi la vortfaradon kaj la gramatikon de unu speco de lingvoj, kaj fari ĝin tiom simpla kaj lernfacila kiom eblas. Tion Zamenhof faris, kun kelkaj tro eŭropecaj esceptoj. **Unue**, ni ne povus ŝanĝi la vortaron kaj la gramatikon de Esperanto al aliaj sistemoj, ĉar ĝi ne plu estus Esperanto. **Due**, kaj nur limige, ni povas plifaciligi la gramatikon eĉ pli, kaj forĵeti ĉiujn vortojn eŭropecajn ankoraŭ ne oficialajn. Sed kion ni ne povas fari, estas ŝanĝi la gramatikon de la Fundamento, ĉar ankaŭ tiukaze la lingvo ne plu estus Esperanto, kaj cetere kiu decidus ŝanĝi kion? Ni povus ĉesi uzi multajn bazajn vortojn, kaj krei neeŭropecajn anstataŭe. Sed tio ne solvus multe, ĉar ĉiu neeŭropa vorto estas facila nur por unu popolo,

nome tiu el kies lingvo ni prenus tian anstataŭantan vorton. Krome mi opinias, ke la plejparto de la gramatiko de Esperanto jam estas sufiĉe simpla por ne esti malfacila por ĉiuj mondanoj. Kaj la jam ekzistantaj bazaj vortoj de la Fundamento ne estas multe pli facile lerneblaj de eŭropanoj ol de neeŭropanoj, ĉar tiuj jamaj vortoj ofte estas jam malsamaj inter la eŭropaj lingvoj. Ekzemple "pano" estas same malfacile lernebla por skandinavoj kaj holandanoj kaj germanoj kaj angloj ol por ĉinoj kaj aliaj.

Do konklude, por helpi ĉinojn k.t.p. ne multe utilas ŝanĝi la jaman bazan vortaron nek la plejmulton de la gramatikaj reguloj.

Kion do ni povas, kaj laŭ mi devas, fari por plifaciligi Esperanton por ĉinoj kaj aliaj neeŭropanoj? Jen kelkaj proponetoj.

**1e**. Ni povos ne plu uzi kelkajn tre eŭropecajn kutimojn gramatikajn kaj anstataŭigi ilin per same Fundament'ecaj kutimoj gramatikaj malpli eŭropecaj. Ekzemple uzi la unuvortan Pasivan Voĉon (La hundo batatis) anstataŭ la duvorta (La hundo estis batata). Kaj uzi, kie necesas, alian vorton por la kvarsignifa "de".

**2e**. Ni povos malpli, aŭ tute ne, uzi nenecesajn malfacilajn gramatikaĵojn, kiel la predikativojn (do diri "Ni elektis lin esti prezidanto" anstataŭ "Ni elektis lin prezidanto" kaj "Li foriris, kaj tio estas bedaŭrinda" anstataŭ "Estas bedaŭrinda, ke li foriris". Ankaŭ uzi malpli da subordaj propozicioj, ekz. ni diru "Hieraŭvespere li foriris, kaj ni bedaŭras tion" anstataŭ "Ni bedaŭras, ke li foriris hieraŭvespere". Ju pli simplaj kaj nekombinitaj estas niaj propozicioj, des pli facilaj por neeŭropanoj sekvi nin dum ni parolas.

Kaj **trie**, plej grave: Ni uzu nur la bazan vortaron, kaj evitu novajn vortojn (neologismojn). Anstataŭe ni uzu kunmetitajn vortojn faritajn per bazaj vortoj, kiel "malsanejo" anstataŭ "hospitalo", kiun lastan eŭropanoj ne bezonas lerni, ĉar ĝi ekzistas en ĉiuj eŭropaj lingvoj, sed ne en la neeŭropaj; do ni plipezigus por la ĉinoj la nombron da lernendaj vortoj. La grupo (ne "ekipo") de Corsetti laborantas ŝanĝi ĉiujn tiajn eŭropajn vortojn al Esperantaj kunmetitaj vortoj, por fari Esperanton pli facila por la neeŭropanoj.

Tiel ni helpos solvi la problemon ke Esperanto estas nun tro malfacila, ĉar eŭropeca, por azianoj kaj afrikanoj por facile lerni Esperanton. Alie ili ne lernos Esperanton, kaj ni estos la kulpuloj. *Marcel Leereveld.*

## RESPONDO AL FRANCISKA .

**1).** Mi ne menciis la vicordon de la vortoj, sed nur la vicordon de la frazpartoj (subjekto, k.t.p.).

**2).** Tiu vicordo de la frazpartoj estas en Esperanto tute libera kaj kutime iel ajn tute klara. Pro la speciala naturo de kelkaj adverboj nur tiuj kelkaj adverboj havas specialajn poziciojn en la propozicio.

**3)** Kvankam en la etnaj lingvoj kun deklinacioj la vicordo estas iomete pli libera ol en sendeklinaciaj lingvoj, en ili tamen estas sufiĉe striktaj vicordoj. Ekz. oni ne povas diri *Er am Meer wohnt nek Gegessen ich viel Frŭchte habe*. Kaj multaj pliaj. Do tia divido ne ŝajnas al mi grava. Kio gravas estas ke ili ĉiuj havas plurajn regulojn por la vicordo de la frazpartoj sed, kun natura escepteto, ne en Esperanto.

**4).** KAJ en la etnaj lingvoj KAJ en Esperanto la kutima vicordo estas Subjekto – Verbo – Objekto - Adjektoj. Kelkaj variaĵoj haveblas en kelkaj lingvoj kaj multege da variaĵoj eblas en Esperanto (sed tamen estas maloftaj).

**5).** Tiun kutiman ordon oni rajtas nomi "normala".

**6).** Mia konkludo do estas, ke estas tre facila ĝenerale (kaj specife) paroli pri la graveco de la diferenco inter la vicordo de la etnaj lingvoj kaj de Esperanto.

**7),** Kiel pri aliaj gramatikaĵoj, en la regulo de la libero de la loko de la frazpartoj ekzistas pro la naturo deviga escepto, nome ekzistas kelkaj adverboj kiuj indikas unu frazparton for de la alia; kompreneble pro tiu natura cirkonstanco tia adverbo devas indiki tiujn frazpartojn, kaj do devige troviĝas antaŭ tia elprenita frazparto, kiel ankaŭ, nur, k.t.p.

**8).** La vicordo de la vortoj interne de frazparto estas alia afero, kiun mi ne traktis. Tiu havas kelkajn, ree naturajn, regulojn: ekz. kelkaj vortospecoj, ekz. "la" kaj la prepozicioj, estas tiom mallongaj ke ili havas fiksitan lokon, alie oni ne povus rekoni ilin (tio do estas danke al la naturo de nia cerbo). Alia kazo: Prepozitivoj devas stari tuj post, aŭ pli bone tuj antaŭ (kiel la rusoj faras) la substantivo, ĉar la vortoj apartenantaj al iu frazparto devas sekvi unu la alian kaj stari kune, pro natura tialo. (Do: "La en potoj floroj floras pli frue", sed aliaj eŭropanoj diras "la floroj en potoj".). Tamen la ĝermanaj lingvoj povas diri "La en potoj kreskantaj floroj".

Cetere mi kompreneble samopinias kun ĉio alia kion Franciska skribis. *Marcel.*

## INTERESA FENOMENO.

Kontraŭe al la etnaj lingvoj eŭropaj, en Esperanto oni de tempo al tempo ekuzas kombinitan formon de "esti" kun adjektivo, ekz. "Tio estas grava" ŝanĝatas de unu persono al "Tio gravas", kaj la Esperantistaro akceptas tion kaj uzas tion. Kompreneble estas nuanco da signifodiferenco. Jam Zamenhof komencis per kelkaj, en siaj poemoj. Do dum la historio de Esperanto multaj tiaj kombinitaj esprimoj ekuzatis kaj nun estas ĝenerale akceptataj. Kaj tio daŭras: La akcepto TUTMONDAS (por estas tutmonda) kaj La letero RICEVATIS (por Estis ricevata) je la naŭa horo, kaj La fiŝaĵo certe MANĜATOS (por estos manĝata) morgaŭ, kaj La vetero PLIBONOS morgaŭ, k.t.p. Jen pliriĉiĝo de Esperanto sen novaj vortoj kaj sen ŝanĝo ante al la Fundament'a gramatiko. *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★




La matenon de la 6a Oktobro Esperantistoj el Ipswich kaj Brizbano kunvenis ĉe la hejmo de Doug Eising. Ni babilis Esperante dum ĉirkaù 3 horoj.

La uzado de aliaj lingvoj estis malpermesita kaj oni ăudis preskaù neniun vorton ne-esperantan. Ni amike diskutis multe da aferoj kaj mi kredas, ke ĉiuj ĉeestantoj ĝuis la sperton. Se eblas, ni intencas regule fari ion similan . *Peter Danzer*

# El Okcidentafriko

Kara Estimata samideano, Roger!

Mi tutkore kaj aparte dankas vin pro via helpo al ni. Mi ege interesiĝas pri AE kaj decidis aliĝi al ĝi. Mi petus al vi meti min sur la liston de ricevantoj de AE. (farita)

Antaŭ nelonge vi eksciis pri mi sed ne profunde. Mi prezentas min al vi ĉi tie.

Kiel rimarkite mi nomiĝas François Hounsounou, 43 jaraĝas. Mi estas ŝtatinstruisto en elementa lernejo. En esperantujo mi estis tejo-estrarano pri landa kaj afrika agado. Dum miaj pluraj vojaĝoj en Eŭropo, mi studis projektmastrumadon en Strasburgo. Mi gajnis sperton kaj disponigis ĝin je la servo de mia popolo subtenante georfojn, malriĉajn infanojn en lernado kaj metilernado.

Mi nuntempe estas la vickunordiganto de Afrika Komisiono de UEA. Multaj eksterafrikaj esperantistoj vizitis/as min kaj tranoktis en mia domo. Mi estas ankaŭ la nacia sekretario de servo internacia.



Do jen mia sinprezento al vi por pli scii, kiu mi estas en Esperantujo. Por fini mi ŝatus atentigi vin ke mi pretas kontribui al la AE per sendado de artikoloj.

Kun amikaj salutoj, *François Hounsounou*

# "Malgrava historieto pri mia vivo" Bob Felby

## Ĉapitro 19 La plej granda miraklo de mia vivo Unua ero



Antaŭ la Universala Kongreso en Tampereo, Finnlando, mi iris por preni parton en la aŭstralia kongreso en la Ora Marbordo, Kvinslando.

Post tiu kongreso mi restis kelkajn tagojn ĉe Marko Anglo, kiu nuntempe loĝas en Brisbano. Tiam Marko Anglo havis telefonon, sed li ne povis telefoni el la domo, nur ricevi telefonvokojn de ekster sia domo.

Eble mi ĉeestis Esperanto-kunvenon en Brisbano, mi estis ie, kaj revenante Marko Anglo diris al mi, ke mia onklino Asta, edzino de onklo Karlo, telefonis el Danlando petante, ke mi kiom eble plej baldaŭ telefonu al ŝi.

Mi do devis piediri al la telefonejo apud la stacidomo Chelmer. Tie mi telefonis al onklino Asta. Ŝi rakontis al mi, ke Gerda, mia fratino, enmalsanulejiĝis, kaj ke ŝi ne vivos ĝis la mateno.

Tiam estis proksimume nur la 14.30-a en Danlando. Tio estis la 22-30-a horo en Kvinslando. Gerda tre malsanis, kaj neniu povis fari ion por savi ŝin !

Mi estis jam plananta mian vojaĝon al Eŭropo esperante revidi ŝin. Subite mi ekploris kvazaŭ mi estus ankoraŭ infano. Tiam venis Marko Anglo kun sia aŭto. Li vidis min ploranta, sed diris nenion. Li veturigis min hejmen, kaj mi enlitiĝis. Ankaŭ Marko Anglo kaj lia edzino enlitiĝis. La ploro ne volis ĉesi.

Marko Anglo havas ĉambron en sia domo dediĉitan al Kriŝno. En ĝi estas granda altaro kun tri diaĵoj, la meza estas la plej superega Dipersonulo, Kriŝno. Mi devas konfesi, ke mi pasigis preskaŭ la tutan nokton sur mia ventro antaŭ tiu altaro profunde plorante kaj preĝante. La materia mondo ne plu ekzistis por mi, estis por mi nur Kriŝno ! . *Daŭrigota* *BobFelby*

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 42-a BRAZILO, JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO 2018 2018 N-ro 171






## 3ZZZ



Se vi ŝatas aŭskulti la ĉiusemajnan elsendon en Esperanto kadre de la radio 3ZZZ bonvolu donaci iom da mono okaze de la jara radiotono por ke ĝi daŭru. Eblas uzi la retejon de 3ZZZ.com.au kaj pagi per kreditkarto aŭ kontaktu Heather Heldzingen rete erikino48@gmail.com aŭ telefone 03 9525 42 95



La kunvokanto *Franciska Toubale*

Eĉ la fuŝa studo de la angla plifaciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj. *Roger S.*